# KATOLIKA SENTO

6 '72

rm



U.E.C.I. ANNO 51°

SPEDIZIONE
IN ABBONAMENTO POSTALE
GRUPPO IV
BOLLETTINO MENSILE

# KATOLIKA SENTO

BOLLETTINO DELLA
**UNIONE ESPERANTISTI CATTOLICI D'ITALIA (U.E.C.I.)**

**Anno 51° - 1972**

Direttore Responsabile:
DON FERDINANDO LONGONI
Via S. Ambrogio 2
Telef. 99.60.050
20051 LIMBIATE (Mi)

Redattore:
P. GIACINTO JACOBITTI
Piazza Santa Maria Maggiore 8
Telef. 738.515
00185 ROMA

Presidente:
P. ALBINO CICCANTI OFM
Via S. Bernardino 26
47037 RIMINI (Fo)

Tesoriere:
DR. CARLO CESARE FERRARI
Viale dei Mille 37
Telef. 267.895
20129 MILANO

Segretario:
DR. FRANCO GALBUSERA
Via della Ghiacciaia 3
Telef. 045 - 22.062
37100 VERONA

Autorizzazione Tribunale
di Milano N. 6536 del 6.4.1964

**KATOLIKA SENTO**

**5 la Jaro** **n° 6** **Junio 1972**

# PENTEKOSTO

Finiĝis jam la preĝoj solenaj de la rito;
la fideluloj mutas pensemaj en preparo
de l' grava Di-promeso, dum vagas la spirito,
kaj ĉe l' memor' bildiĝas la sankta Krist-altaro.

La kunvenej' kvietas!... Subite, improvize
el la ĉielo tondras, tempestas tra l' aero,
ŝvebadas fajrolangoj super la kapoj dise,
kajĉiun kapon trafas la Pentekost-mistero.

Animon luman havas nun la trafitaj homoj,
kaj mirindaĵojn faras je transnatura miro;
sin esprimante buŝe en ĉiuj idiomoj,
ili la gentojn logas per la mirakla diro.

L' adeptojn ili gvidas laŭ vere ĝusta vojo,
dotitaj je talento, ebriaj je fervoro,
celantaj al senfinaj sereno, paco, ĝojo,
ĉe menso saĝoplena kaj ambatanta koro.

Venu, Spirito Sankta, inspira Parakleto,
descendu Vi denove kun Via flama puro;
tra l' mondo karitaton enblovu kun impeto,
kaj inter homoj daŭre ĝi restu en futuro.

Luigi Minnaja

# NECESO DE INTERNA SILENTO POR AŬSKULTI LA VOĈON DE LA SPIRITO

(Parolado de la Papo dum la ĝenerala aŭdienco de la 17-a de majo 1972-a).

"Ni estas proksimaj al la festo de Pentekosto, kiu memorigas kaj renovigas, se al Dio plaĉas, iumaniere kaj iumezure, la malsupreniron de la Sankta Spirito sur la Apostolojn kuniĝintajn en la manĝosalono de Jerusalemo kun la unua komunumo de la fideluloj de Jesuo, la Majstro, la Mesio, mortinta sur la Kruco, reviviĝinta kaj jam malaperinta, suprenirante al la ĉielo. La grupo de la fideluloj konsistis proksimume el centdudek personoj, kun la piaj virinoj kaj kun Maria, la Patrino de Jesuo. Estas tre malfacile rakonti ĉi tiun misteron-eventon, kvankam ĝi plenumiĝis kun eksteraj signoj tre fortaj: subita tondro, impeta invado de vento tra la tuta domo, kaj apero de lumaj flamoj, kiel fajrolangoj sur ĉiu el la ĉeestantoj, kiuj sentis sin ebriaj je energio, je ĝojo kaj je granda volo proklami ardajn laŭdojn al Dio, naskiĝantajn kvazaŭ profeta poezio el la interno de la koroj. Ĝi estis la Sankta Spirito, nome la Amo vivanta, kiu devenas de Dio, la Patro, de Dio Filo, la Vorto, Dio Li mem, la Tria Persono de la Sanktega Triunuo, la unika Dio revelaciita en la mistero de sia intima Vivo senfina, abisma, malfermita al la homoj, iumaniere, ĉiam malgrandega kaj analogia kompare kun la senfina realo de Dio Unu- kaj Tri-persona, sed elbordiĝanta je lumo, je ĝojo kaj je mistero rilate al la homa inteligenteco.

Fakte, en tiu momento naskiĝis la Eklezio: ĝia korpo, konsistanta el homoj de ĉi tiu mondo, estis komplete trapenetrita de la Sankta Spirito, de iu forto supernatura, kiu donis la vivon al ĉi tiu komunumo, kiu nomiĝis Eklezio. Kaj tuj unu sama Spirito donis al ĉiu

membro de la eklezia komunumo apartan funkcion, apartan oficon ĉiam por la komuna bono. Ekde tiu unua horo la Eklezio naskiĝis Unu, Unika, Hierarkia kaj Komuneca.

Se ĉi tiu evento estas vera, reala, kiel ĝi fakte estis kaj ankoraŭ estas, ĝia ega graveco ne povas esti preteratentata. La agado de la Sankta Spirito estas fundamenta por la kristana religio; ĝi transfiguras la homojn, kiuj penetras en ĝian influ-zonon; ĝi estas decida por nia Savo. Tamen, la agado de la Sankta Spirito estas mistera kaj superas nian normalan intelektan kapablon; ĝi eĉ povas esti malprave interpretata kiel utopio, fantazio, frenezo, kaj eĉ diabla agado. Fakte, la Apostolo Johano en sia unua letero skribis: "Amataj, kredu ne al ĉiu spirito, sed provu la spiritojn ĉu ili venas de Dio, ĉar multaj falsaj profetoj vagadas tra la mondo" (4,1). Kaj Sankta Paŭlo al la Tesalonikanoj: "Ne estingu la Spiriton; ne malestimu la profetaĵojn; elprovu ĉion; tenu firme tion, kio estas bona" (5,19-21).

Kvankam pri idealismo, psikanalizo, psikiatrio, magio k.t.p. nun multe oni traktas, tamen estas temo, kiun ni verŝajne ankoraŭ ne ĝisfunde pristudis: la teologio de la Sankta Spirito kaj la realaĵoj, kiuj devenas de ĝia agado sur la homan animon. La Sankta Spirito plenigas nin per Sia graco, per Siaj donoj, per Siaj fruktoj, kaj por ĝin atingi ĝi montras al ni la vojojn, kiuj estas la preĝo kaj precipe la sakramentoj, portantoj ĝuste de la graco, tio estas de ĝia agado en ni. (Rom. 5,5; 1a Kor. 3,16;k.t.p.)

La katekismo tion instruas al ni, kaj ĝi estas fundamenta por ekzakta koncepto pri la kristana vivo, precipe en tio, kio koncernas kelkajn punktojn, kiujn ni volas hodiaŭ memorigi. Ni apenaŭ mencias ilin.

"La Spirito blovas kie ĝi volas", diras Jesuo en la fama dialogo kun Nikodemo (Jo.3,8); ni ne povas, tial, skizi ekskluzivajn normojn doktrinajn kaj praktikajn pri la intervenoj de la Spirito en la vivon de la homoj. Ĝi povas manifestiĝi en la formoj plej liberaj kaj neantaŭvideblaj. Ĝi "ludas sur la mondotero" (Sent. 8,31); la hagiografio rakontas al ni multajn kuriozajn kaj belegajn aventurojn de la Sanktuloj; ĉiu spirita direktoro scias ion pri tio. Sed unu regulo sekvenda ekzistas por tiu, kiu volas kapti la supernaturajn ondojn de la Sankta Spirito; ĝi estas la internaĵo. La rendevuo por la renkonto kun la nedifinebla Gasto estas fiksita en nia animo. "Dulcis hospes animae" (Dolĉa gasto de la animo) diras la mirinda liturgia himno de Pentekosto. La homo estas "templo" de la Sankta Spirito, ripetas al ni Sankta Paŭlo (1a Kor.3,16-17; 6,19; 2a Kor. 6,16; Ef. 2,22). Kvankam la moderna homo, la kristano kaj eĉ la pastro, celas sin sekularigi, li ne povos nek devos forgesi ĉi tiun fundamentan neceson de kristana vivo animita de la Sankta Spirito: la internaĵon. La Apostoloj faris sian naŭtagan preĝon de Pentekosto. Estas necesa la interna silento por aŭskulti la Parolon de Dio, por senti Lian ĉeeston kaj kompreni Lian alvokon. Hodiaŭ nia psikologio estas tute orientita al ekstero. Ĉi ekstera mondo estas tiel absorbanta, ke nia atento estas grandparte ekster ni; ni estas preskaŭ ĉiam ekster nia persona hejmo; ni ne kapablas mediti, ne kapablas preĝi, ne kapablas silentigi la tumulton internan de la interesoj eksteraj, de la pasioj. Ne estas spaco kvieta kaj pia en la koro por la flamo de Pentekosto. Ni verŝajne pretendas havi specialajn supernaturajn donojn, kiuj permesas al ni depostuli blindan aŭtonomecon por la spiritaj kapricoj de

niaj instinktoj, kaj ni ne klopodas konduki al la aŭtentika dia inspiro niajn sentojn kaj niajn pensojn. La konkludo venas per si mem: oni devas doni al la interna vivo ĝian lokon en la programo de nia zorgoplena ekzistado; lokon unuagradan, silentan kaj puran; ni devas retrovi nin mem, se ni volas esti pretaj por ricevi la Spiriton vivigan kaj sanktigan; alie, kiel aŭskulti ĝian "ateston"? (Jo. 15,26).

Estus aliaj konsideroj aldonendaj pri la akcepto de la Sankta Spirito internen de ni. Ekzemple, kia rilato povas esti inter ĉi tiu voĉo de la Spirito, la voĉo de la koro loĝata de la Parakleto, nia pledanto, nia advokato, nia interna Majstro, kaj la natura voĉo, kvankam ankaŭ ĉi tiu tiom delikata kaj nobla, de nia homa konscienco? Sokrato posedis "dajmonon", kiu inspiris lian konsciencon kvazaŭ dia voĉo; Gandhi obeis al sia "mallaŭta eta voĉo," kiu en kelkaj momentoj sin aŭdigis interne de li.

Sed, flanke lasante la eksterordinarajn ekzemplojn, ĉiu homo posedas en si fonton intuician kaj normigan. Nun la demando: Ĉu ĉi tiu voĉo estus kontraŭa diferenca, aŭ koincida kun tiu je supernatura inspiro de la dia Parakleto? Ĝi estas demando, kiu apartenas al la studoj de kompetentuloj. Ni kontentiĝu por la momento konsideri la efikojn de kontakto inter la teologio de la Sankta Spirito kaj la psikologio de la homo.

Alia demando estas tiu malnova, sed nuntempe tre atentata, kiu kontraŭmetas la religion de la aŭtoritato al la religio de la spirito; ĉi lasta preferata de la kontraŭuloj de la Eklezio, institucia kaj hierarkia, por depostuli la liberecon de Eklezio demokrata, vivanta laŭ la religia spirito de la komunumo. Ni ĉiuj iom konas la esprimojn de ĉi tiu kritika situacio.

Ni pensas, ke ĉi tiu demando, metita internen de la Katolika Eklezio, atencas kontraŭ la ekzistado de la Eklezio mem, kaj kondukas al la estingiĝo de la vera flamo de Pentekosto, tute malzorgante la penson de Kristo kaj de la Tradicio.

Ni celebru bone Pentekoston, fandiĝon de la Sankta Spirito kun sia Eklezio.

trad. L.M.

---

LA I.K.U.E. - KONGRESO, kio okazos de la 15a ĝis la 21a de julio en Como, invitas ĉiujn katolikajn esperantistojn. Kongresejo estos la luksa vilao Olmo, situanta en la fama urbo, en ka kadro de la rava panoramo de la lago de Komo, apud la svisa limo.

KIEL ESTIS ANONCITE en la 5a numero, Esperanto-tago okazis en Mantovo la 21an de majo; kaj la 28an nova Esperanto-strato estis inaŭgurita en Sorbolo, ĉe Parma. Krome de la 7a ĝis la 12a de majo okazis la IFEF-Kongreso en Lugano (Svisujo); komence de la kuranta junio estis celebrita "Miela luno"en Rimini, kaj je la 11a estis oficiale fermita la lernojaro kun inaŭguro de Esperanto-ekspozicio en Cesena.Ĉie ĉeestis, celebris la meson kaj predikis en Esperanto P.Ciccanti, kelkfoje kun aliaj esperantistaj kuncelebrantoj. En Cesena la meso estis celebrata en la kripto de la konstruota preĝejo, kiu estos dediĉita al Nia Sinjorino de la Espero. Lokaj aŭtoritatoj kaj simpatiantoj partoprenis en la celebroj, kaj favore raportis lokaj gazetoj.

En la simpatia iniciato "Miela luno" en Rimini, partoprenis ĉijare kun multaj aliaj, ankaŭ tri esperantistaj paroj: Janina kaj Wonter Frank Pilger (ŝi poli-

no, li nederlandano) Sylva kaj Pavel Polnichy el Ĉeĥoslovakio, Eva kaj Marian Zobrzynski el Varsovio. Ĉiuj ĝuis senpagan restadon en unuaklasa hotelo dum 8 tagoj kun tre alloga kaj riĉa programo.

INAŬGURO DE "KORSO ESPERANTO" EN LA INDUSTRIA KVARTALO DE PADOVO

La 14an de majo en Padovo, en la aŭlo de la Studocentro "Murialdo" (kie estis aranĝita interesa ekspozicio de malnovaj Esperanto-lernolibroj por italoj, de ĉiuj "ŝlosiloj de Esperanto" en la diversaj lingvoj, kaj de fotoj pri multaj el la 37 Esperanto-stratoj ĝis nun ekzistantaj en Italujo), en ĉeesto de reprezentanto de la Komerca Ĉambro kaj de cento da gesamideanoj alvenintaj el multaj urboj, la Prezidanto de la Itala Esperanto-Federacio, inĝ. Giordano Azzi, verve kaj kompetente prelegis pri la temo "La solvo de malfacilaĵo en la ekonomiaj rilatoj kun la landoj havantaj internaciajn lingvajn problemojn". Sekvis interesa debato, kiun partoprenis pluraj ĉeestantoj.

Post regalo de trinkaĵoj kaj dolĉaĵoj, granda aŭtoĉaro plenplena de esperantistoj, sekvata de longa vico da automobiloj, direktiĝis al la inaŭgurota strato, situanta en la industria kvartalo. Antaŭis la aŭtoĉaron du urbaj policanoj sur motorcikloj, kiuj ĉe ĉiu stratkruciĝo haltigis la trafikon por ebligi la pasadon de la tuta sugestia aŭtomobilvico. Ĉe la komenco de la nova strato, kun ses kurejoj, akceptis la kunvenintojn urba skabeno kaj la loka paroĥestro. Samideano Giovanni Saggiori, je nomo de la Padova Esperanto-Grupo, diris kelkajn porokazajn vortojn; sekvis la malkovro de la strattabulo, post kio la paroĥestro benis la Korson Esperanto, dirante interalie

preĝon, por ke sur tiu strato neniam okazu aŭtomobil akcidentoj.

Revenințe al la Studocentro, la kunvenintoj (inter kiuj 9 hungaroj kaj unu germano) ĉeestis la meson en Esperanto, celebratan de Patro Albino Ciccanti en la loka kapelo.

Post komuna tagmanĝo, disvolviĝinta en gaja atmosfero, okazis projekciado de tre interesa parolfilmo en Esperanto de la aŭtomobilfabriko FIAT pritraktanta la historion de la fabriko mem.

Dum la posttagmezo la gastoj, en speciala aŭtobuso, vizitis la ĉefajn vidindaĵojn de la urbo sub la lerta gvido de Carlo Minnaja, kiu donis la koncernajn klarigojn en Esperanto.

(El la Radio Roma-Esperanto de la 4a - 6-'72a)

POR LA MOZAIKO HONORE al N.S. de la Espero, en Nazareto:

| | |
|---|---:|
| V. Corrias - (Cagliari) | 10.000 |
| G. Saggiori - | 1.000 |
| N. Pagliari - | 5.000 |
| A. Ciccanti - (Rimini) | 1.000 |
| C. Canu - | 10.000 |
| N.N. - (Hungarujo) | 2.400 |
| L. Terrazzani (Verona) | 10.000 |
| E.G. de Bilbao (Hispanujo) | 4.444 |
| H. Renschler - (Bari) | 3.000 |
| | 46.844 |

Ĝis nun: £. 226.489

Ni atendas de multaj niaj fervoraj geamikoj partopre-

non en ĉi tiu bela iniciato. Ni devas atingi la sumon de ĉirkaŭ 500.000 liroj. Tiuj, kiuj donacon almenaŭ 10.000 lirojn, ricevos omaĝe de ni bildkarton de tiu Madono, benitan de la papo, kun Vatikana poŝtmarko kaj poŝta stampo de ĝia inaŭgura tago.

PETU GRANDNOMBRE la religiajn bildetojn pri Nia Sinjorino de la Espero. Ili kostas po 15 liroj.

LAŬ SCIIGOJ RICEVITAJ de Béla Berceli, ĉefsekretario de la Hungara Esperanto-Asocio, ni povas jam informi, ke la verko de Gàrdonyi: "La Sklavoj de Dio", pri kio zorgas la Hungara Esperanto-Asocio kun helpo de IKUE, jam depost du monatoj estas en la presejo. La manuskripto, traduko farita de d.ro J.Hamvay el la hungara, ricevis revizion de la eminenta hungara esperantisto Kolomano Kalocsay. Oni jam havas ĉiujn necesajn permesojn, inkluzive de la heredantoj de Gàrdonyi pri aŭtoraj rajtoj kaj aliaj. La libro estos kompostita kaj presita ekde aŭgusto kaj aperos je la fino de ĉi tiu jaro. Jam multaj esperantistoj petis de ni informojn, kaj ni povas kalkuli laŭ tiuj petoj, ke grandan disvastigon ĝi tuj havos en Hungarujo kaj Pollando. Ni do estas certaj pri ĝia granda sukceso. Tralegante ĝin oni aparte estas mirigitaj pri la eksterordinara konoflanke de la aŭtoro, pri la mezepokaj hungaraj kostumoj, ĝis la plej malgrandaj detaloj. Tio permesis al li mirinde revivigi figurojn entute diversajn, de la plej simplaj homoj ĝis personoj de la reĝa familio, tiel plastike reproduktitajn de lia potenca arto, ke per li oni estas enkondukataj en tiun medion preskaŭ magie. Ni, kiuj havis la feliĉon koni la manuskripton, konfesas, ke ni estis ravitaj pri tio; kaj ni dankis al Esperanto, kiu konigis al ni ion, kio sen

dube estos unu el la plej belaj juveloj el la esperanta literaturo.

LA JUNA KAPUCENO p. Georgo J. Korytkowski prezentis en la Pontifika Antona Universitato en Romo esperantlingvan tezon: "La ekumena elemento en la internacilingva problemo". Gvidanto de la licencia disertacio estis prof. Rinaldo Weijenborg. La enkonduka ĉapitro de la tezo aperis en "Espero Katolika", maje de la 1972a. Oni esperas, ke la tre interesa verko estos siatempe presita, por ke interesitoj povu profiti pri tio.

BONVOLE NI KONSENTAS ALTIRI la atenton de nia legantoj, pri la "Notiziario del Gruppo Esperantista Tridentino", bulteno vere tre plaĉe sin prezentanta laŭ aspekto kaj enhavo. Aparte grava estas itallingva artikolo de Pietro Dao, "Com'é l' Esperanto?". Kvarmonata revuo, 16-a paĝa, senpage al asocianoj kaj simpatiantoj. Direkcio-Redakcio: Via Cavour, 17 38100 Trento.

LA 3an DE JUNIO LA ROMA S-ANINO Lydia Senes, bone konata en nia kampo pri sia "Eta bukedo" edziniĝis al s.ro Gino Bachechi.
Al la nova geedza paro niajn plej korajn bondezirojn.

LA 8an DE JULIO EN LA BAZILIKO de la Sanktaj Kosmo kaj Damiano je la 12a h. estos celebrata esperantlingva pornupta meso okaze de geedziĝo de ges-anoj s.ro Gianfrancesco Barbalace kaj Lucia Giurelli. La romaj katolikaj esperantistoj estas varme invitataj. Kantos la esperantan "Ave Maria" m$^{\underline{o}}$ Dario Sanzó.

NI SALUTAS ĈIUJN NIAJN legantojn, precipe tiujn, kiuj libertempos vizitante esperantajn kongresojn kaj

kunvenojn. Eksperimente ni ĉijare daŭrigos la esperantan diservon en S.M.Maggiore ĉiun dimanĉon je la 10,30 h., precipe por komplezi eventualajn turistajn samideanojn.

ALIĜIS AL UECI-CECR: Catania: E.Grupo; Mondovì: P.Beccaria; Santa Giustina (FO): M.Partenza; Aŭstrujo: F.Casar; Usono: S.Klimowicz; E. Homelsky. Entute: 412.

# ROMA ESPERANTA VOĈO nº 106

ĈE PENTEKOSTO, kiel kutime, ankaŭ ĉijare la papo disvastigis mesaĝon al la katolika mondo pri la universaleco de la misia devo por la tuta eklezio. Ĉijare kuniĝas ankaŭ en la solena admono notindaj datrevenoj: 350 jaroj de la kongregacio por la propago de la kredo; 150 jaroj de la fondo de la "Institucio por la disvastigo de la kredo" kaj kvindek jaroj de la kunigo daj instituado kiel pontifikaj de diversaj misiaj institucioj. La papo esprimis sian deziron, ke la 1972a jaro estos komenco de nova erao de vigla progreso. Ĉar la eklezio estas esence misia, oni ne povas esti vere kristano, se oni neniel kunlaboras por la evangelizado. Sendube ne al ĉiuj estis ordonite, ke ili iru tra la mondo predikante la evangelion; sed ĉiu laŭ siaj kapabloj devas kunhelpi: kelkaj per la vorto, aliaj per la plumo; iu per la mono, alia per manlaboro. Multaj povos dediĉi al ĉi tiu celo sian tempon; ĉiuj povas oferi por la misioj pre-

ĝojn, suferojn. Kvankam en oktobro oni celebradas la pormisian tagon, tamen oni ne devas limigi al tiu dato siajn misiajn zorgojn; ĉi tiuj devas esti kiel spirado, kiu neniam devas ĉesi, por ne morti. Ĉu la spirita asfiksio, en kiu hodiaŭ tiom da katolikoj kaj institucioj baraktas, - sin demandas la papo - ne devenas de tiu tro longa manko de misia spirito? Fakte, kelkaj problemoj je malvasta intereso ofte forgesigas la imponan problemon de la universala misio de la tuta eklezio. Kiom da internaj tensioj en kelkaj eklezioj aŭ lokaj institucioj malaperus, se oni havus firman konvinkon, ke la savon de lokaj komunumoj oni akiras per kunlaboro en la misia agado, por ke ĉi tiu disvastiĝu ĝis la lastaj limoj de la tero! La moderna mondo favoras hodiaŭ pli ol iam ĉi tiun penetreblecon. Kvankam troviĝas ankoraŭ nacioj, kiuj obstine fermiĝas kontraŭ la evangelio, estas tamen evidente, ke la popoloj pli kaj pli celas interrenkontiĝojn, kaj pro tio ili rilatas ankaŭ kun la eklezio. Oni do nepre devas profiti ĉi tiun novan situacion de l' eklezio, kiu ebligas doni mondskalan vastecon al ĉiu kunlaboro por la misia idealo. "Ĝuste pro tio, ke ni estas katolikoj, - deklaris antaŭ 150 jaroj la unua prezidanto de la Pontifika Agado por la disvastigo de la kredo, - ni devas hodiaŭ zorgi ne sole por tiu aŭ por alia aparta misio, sed por la misioj de la tuta mondo". "La misia universalismo - konkludas la papa mesaĝo - devas esti la ĉefa motivo, kiu animus ĉiujn organizintojn ĉirkaŭ la tutmonda tago, kiun ni anoncas. Konsolas nin agnoski, ke spite de la malfacilaĵoj, la misiaj pontifikaj institucioj ĝis nun ne nur ne malrapidigis sian iradon, sed ĉe kelkaj ŝtatoj eĉ superis la malnovajn rekordojn. Ni do preĝu la Sinjoron, por ke la Pontifikaj misiaj institucioj, renovigínte siajn strukturojn laŭ la direktivoj de la Dua Vatikana Koncilio, sub la gvidado de la humila

Kristvikario kaj de la episkopoj, kapablu en ĉi tiu 1972a jaro partoprenigi la tutan dian popolon konscie kaj efike en la eklezia misia agado".

OKAZE DE LA IV JARCENTA datreveno de la elekto kiel papo de Gregorio XIII, kiu pligrandigis la Roman Kolegion", fonditan de sankta Ignaco de Lojola, unuan bazon de la hodiaŭa Gregoria universitato, la papo akceptis aŭdience ĝiajn Rektoron, docentojn kaj lernantojn. Ĉar la parolado, kiun li adresis al ili, celis ankaŭ ĉiujn aliajn katolikajn universitatojn, ĝi havas apartan gravecon. La papo rimarkis, ke la naskiĝo de tiu instituto okazis dum cirkonstancoj, kiuj tre similas al la nuntempaj, je malmultaj jaroj post la celebrado de grandaj ekumenaj koncilioj, tiam de la Tridenta, hodiaŭ de la IIa Vatikana. Ankaŭ tiam kiel hodiaŭ, la kredo estis en danĝero; la sacerdota vivo, ĝia sankteco kontraŭstarata. Al la historia misio la universitato kontribuis donante el sia sino grandajn teologojn, inter kiuj S. Roberto Bellarmino, Suarez, Cornelio a Lapide, Segneri, ktp.; 18 sanktulojn, 23 beatulojn, 15 papojn, sennombrajn kardinalojn, episkopojn, misiistojn. En la temo de ĝia kultura misio, post la mencio de la multaj progresoj faritaj dum la jarcentoj, kaj precipe dum nia epoko por nuntempiĝi laŭ la paŝo ĉiam pli rapida de la mondo, kaj post laŭdo al ĉiuj, kiuj kontribuis al tio, la papo volis fiksi kelkajn orientigajn liniojn. La fundamenta principo de li rememorigita, estas ke la teologio devas servi al la kredo; kaj ĝia startpunkto estas la vivanta realo de Dio, kiu revelaciis sian misteran Triunuon, pere de sia Filo, kaj kiu en li donas al ni la savon, komunikante ĝin al ni dum la tempo pere de la eklezio. La teologio ne estas do io abstrakta, for de la vivo de la eklezio; ĝi nenio alia estas ol kredo en

la ordo de la konceptoj. Estas necese mediti pri la intima kunligo kaj la reciproka impulso de iliaj interrilatoj: el unu flanko la teologio donas ne anstataŭigeblan helpon al la kompreno de la kredo; el alia flanko la kredo liveras senkomparan riĉecon al la homa inteligento. Sed kredo, kiu estas esplorrigardata de la teologio devas veni el sia aŭtentika fonto kaj doni garantion, ke ĝi estas el Dio; kaj la instrurajto de la eklezio devas deveni unue de la supera instrurajto de Petro, kiu parolas al siaj posteuloj; kaj kun li, intime kunigita, la instrurajto de la apostoloj pere de la episkopoj. Ili havas komunan radikon: la dian revelacion. Pro tio - admonis la papo - la teologio devas intime rilati kun la eklezia instrurajto kaj kun la tuta komunumo de la kredantoj. Sekve, ĉiu instruo, kiu ne estas laŭ la sento de l' eklezio, ne devas esti ebla en katolika teologia fakultato. La teologio estas por la servo de la eklezia doktrino, ĝi povas havi komplementan, ne kontraŭstaran funkcion. La katolika universitato sin distingas per sia kredo, per siaj fidelaj rilatoj al la eklezio, per sia kritiko al la kuranta pensmaniero de la mondo en ĝiaj renkontiĝoj kaj konflikto kun la diaj veroj. Fine la papo, esprimante sian grandegan esperon en la fruktoj de la Katolika Universitato, petis de ĝi plenan reciprokan konfidon.

LA UNUA AMASA hungara katolika pilgrimado, post la dua tutmonda milito, alvenis al Romo la 19-an de majo, vendrede, 300 fideluloj, gvidataj de ok episkopoj kaj sesdek sacerdotoj estis akceptitaj de mons. Jozsef Ijjas, ĉefep. de Kalocsa, (kaj prezid. de la hungara episkopa konferenco). Sabate estis solene kuncelebrita en la baziliko de S. Maria la Granda, diservo, dum kiu predikis la apostola administranto de Szombathely, mons. Fabian Arpàd. Dimanĉe la solena me

so okazis en Sankta Petro, kaj parolis mons. Ijjas. Poste la pilgrimantoj vizitis la bazilikon, la Sikstan Kapelon kaj la vatikanajn ĝardenojn. Lunde, la 23an de majo ĉiuj iliaj pastroj kaj episkopoj estis akceptitaj de la papo, kiu latinlingve esprimis sian ĝojon por ilia vizito, kaj admonis ilin defendi la unuecon de la kredo kaj unuecon inter si, pere de la fideleco al la Apostola Sidejo. Marde la pilgrimantoj vizitis Asizon, kaj reveninte al Romo merkrede, post la ĝenerala aŭdienco ĉiuj estis akceptitaj de la papo. Antaŭe en la ĝenerala aŭdienco la parolado de la papo temis pri la kristana atesto, kiun ĉiu, kiu ricevis la Sanktan Spiriton devas doni al la mondo. Alia aŭdienco sekvis por kelkmiloj da infanoj, kaj fine en la salono "Klementa", jen la vico de la hungaroj, kiuj portis ,kiel donacon al la papo, gobelinon reprezentantan Sanktan Stefanon, kun la reĝa krono, ornamita de la papa juvelo. "Ilia pilgrimado, diris al ili la papo, rememorigis la neforgeseblajn kredatestojn, kiuj estis la 34a Eŭkaristia Kongreso de la 1938a en Budapeŝto kaj la celebroj de la naŭa jarcento post la morto de Sankta Stefano, hungara reĝo. Ĉifoje la granda evento kuniĝas kun alia historia dato: la naskiĝo kaj la bapto de S.Stefano, kio koincidas kun la unua jarmilo de la hungara nacio kaj de la eklezio, de li fondita, al kiu li transdonis sian amon kaj fidelecon al la papo. De tiam, kaj pro lia deziro ekzistas apud la tombo de S.Petro nacia preĝejo por hungaroj. "Tiun fidelecan heredaĵon - diris la papo - vi devas gardi kaj transdoni eĉ pli kaj pli riĉan al la estontaj generacioj". Kaj alvokante de la S.Spirito la forton por ĉiuj ĉeestantoj, por ke ili estu ĉiam valoraj atestantoj de la Sinjoro, la papo akcentis: "Kredo ne estas malhelpo al la homa progreso; eĉ, kiel asertas la Kon -

cilio pri la eklezio, ĝi altigas la noblecon de la persono, firmigas la homan societon, kaj donas al la ĉiutaga homa laboro pli profundan sencon kaj signifon". Niaj bondeziroj - konkludis la papo - kiujn nia preĝo akompanas, kaj kiujn ni konfidas al la perado de Maria, Patronino de Hungarujo, iras do al via eklezio, sed ankaŭ al via nacio, kiu kune kun la unua superis la unuan jarmilon de sia konstitucio, kaj kune daŭrigas sian iradon: kaj ni tion deziras karakterizita per rilatoj ĉiam respektaj kaj korfavoraj, en la agnosko de la respektivaj rajtoj kaj en la lojala kunlaborado al la servo de la hungara popolo".

EN TIU SAMA MATENO la papo celebris la meson subĉiele en la sporta kampo de la kolegio "Sankta Petro", kiu festis sian dudekkvinjaran datrevenon de sia vivo. Temas pri porpastra seminario, kie kuniĝas studentoj el pli ol cent landoj, por perfektigi sian formadon je universitata nivelo. Tiel la Papo deklaris, ke li travivadis ankoraŭfoje la "privilegian horon" de la apostola Pentekosto. Estas interese rimarki, ke tiu kolegio, kiu hodiaŭ povas ricevi 170 personojn, dum siaj dudek kvin jaroj formis 850 sacerdotojn, kiuj, revenante al siaj diocezoj ricevis respondecajn taskojn, pleje kiel direktoroj de aliaj seminarioj. Pli ol 50 el ili estis elektitaj episkopoj kaj du, la tanzaniana Rugambwa kaj la indoneziana Darmojuwono, apartenas al la kardinala kolegio. Pluraj el ili estas sekretarioj de romaj kongregacioj. Hodiaŭ la kolegio gastigas 153 sacerdotojn: 80 el Azio, 56 el Afriko, 15 el Oceanio kaj du el la latina Ameriko.

BEDAŬRINDE LA NEPRISKRIBEBLA luma ĝojo de tiu evento, estis vualita de nigra nebulo, kiam dum la pentekosta dimanĉo iu furioza frenezulo en la baziliko de Sankta Petro, abrupte surgrimpinte la mond-

faman "Pietà" de Mikelanĝelo, atakis ĝin per martelado, grave difektante la Madonon. Nur post la unuaj momentoj de ĝenerala konsterno, iu papa gardisto kaj diversaj personoj sin ĵetis sur lin, sukcesante haltigi la frenezan frakasadon. Kvankam tiu estis hungardevena, tamen li ricevis Aŭstralian naciecon, kaj neniel li rilatis al la pilgrimantaro.

POST LA ABOMENINDA atenco al la monumento de la "Pietà" ni ricevis el Ateno - Grekujo ĉi tiun leteron, kiu cetere esprimas la senton de ĉiuj niaj legantoj:

"Ciela Reĝino, pardonu niajn pekojn! Leginte la frenezecon kontraŭ la disenta skulptaĵo de la majesta Mikael-anĝela "Pietà" en la Baziliko de Sankta Petro, ni loĝantoj en ĉi tiu teritorio de Esperanto kaj ĉiuj aliaj Helenujanoj, sentas naŭzegan abomenon al ĉi-fuŝa sakrilegio. Bonvolu, plej Resp. Patro, transigi nian malĝojon al la estraroj de U.E.C.I., IKUE, kiel ankaŭ al la superaj aŭtoritatoj de la Sankta Sidejo. Di patrino plej sankta, benu niajn paŝojn! Ĉiam korani - me via en Kristofido
K.G.Eliopulos"

SUR LA VOJO DE LA priorientaj studoj, sed ankaŭ pro religia intereso, la mahometanoj pli kaj pli estas en la centro de nia atento. Ne plu kiel malamikoj en krucmilitoj, sed kiel interparolantoj. En Romo, en la akademio de "Lincei" okazis kunveno pri la temo "Kristanismo kaj Islamismo, laŭ la kadro de agado kaj de studoj pri orienta mondo. Parolis jesuito p. Poggi pri la temo: "La studado de la religia fakto kiel kondiĉo de reciproka ŝanĝo inter Kristanismo kaj Islamismo," plue, prof.oj Abel, Veccia Vaglieri kaj Rizzitano; kaj fine p. G. Anawati, kiu parolis pri la niatempa kredo kristana kaj muzulmana. Neniu dubo, ke ĉi tio mon-

tras reciprokan malkovron: oni celas valorigi ĉion, kio unuigas: unue la monoteisman fundamenton, poste la komunan religian tradicion. Oni eĉ devas agnoski, ke la muzulmanoj konas kristanismon pli ol tio kio okazas en la kontraŭa flanko; kiel konate, ili agnoskas en Kristo profeton, kaj havas ian familiarecon kun la Biblio, dum ni konas la Koranon nur pro aŭditaĵoj, kaj kelkfoje eĉ kun polemikaj intencoj. En la esperantista medio bonŝance ni nun havas modelan tradukon de tiu altvalora verko. Kompreneble oni ne devas kuri post supraĵaj revoj; kaj oni ne devas nur insisti pri tio, kio estas simila; eĉ, la diferencoj estas tre interesaj, kaj oni devas funde pristudi ilin.

KVINONO EL LA LOĜANTARO de Zambio estas hodiaŭ katolika; ĉar 820.000 estas la baptitoj inter la 4 milionoj da loĝantoj. La diocezaj pastroj estas sesdeko kaj 380 la misiistoj. Laboras en la lando ankaŭ 160 reliĝiulinoj aŭtoktonaj kaj ĉirkaŭ 450 eksterlandaj. En la naŭ diocezoj de Zambio ekzistas 178 preĝejoj, kun kapableco de 400 homoj por ĉiu kaj preskaŭ 800 kapeloj. La seminarianoj bedaŭrinde iom malkreskis, kompare al la antaŭaj jaroj: preskaŭ 400 en la minoraj seminarioj kun dudeko da teologiaj studentoj. Plue oni devas alkalkuli kelkajn aliajn, kiuj studas eksterlande.

LA SOCIETO POR EKSTERLANDAJ misioj en Usono, pli konata kiel Kongregacio de la patroj de Maryknoll, prizorgis biblian publikaĵon, sub titolo "The Radical Bible", sekvante ekzemplon de simila verko efektivigita antaŭ kelkaj jaroj en Germanujo, sub la titolo "Bibel provokativ" (la Biblio stimulanta). La vorto "Radical", klarigas la iniciatantoj, ne devas okazigi miskomprenon; ĝi havas la latinan signifon de

"radiko", "fundamento"; kaj ĝi volas signifi, ke "la dia Vorto atingas la radikon, la startpunkton de ĉiu realo". Ne temas pri nura traduko aŭ pri parafrazo, sed pri aplikado de la Biblio al nia tempo. Apud la diroj de la Malnova aŭ de la Nova Testamento, estas rimarkataj situacioj de la nuntempa eklezio, citaĵoj de la II-a Vatikana Koncilio, de la Ekumena Koncilio de la eklezioj, de Paŭlo VI, de la Universala Deklaro pri homrajtoj, kaj de eminentuloj el la diversaj kristanaj konfesioj. "Nia espero - oni legas en la enkonduko de la libro - estas, ke la komparo de la dia vorto kun la homaj problemoj kaj aspiroj estu "energia stimulado, ĉar "la vorto de la Sinjoro dispecigas la cedrojn kaj estigas fajrajn langojn".

PATRINO MARIA ANTONA AZCUNE, hispana religiulino de la Societo de Maria, estis elektita ĝenerala kunordiganto por religiulinoj en ĉefdiocezo de Rio-de-Ĵanejro. Tiu tasko, kiel deklaris kard. Eugeno De Araujo Salas, ĉefep. de San-Salvadoro de Bahio, kun portos rajtojn kaj devojn kiel tiuj de episkopa vikario. Estas la unua fojo, en la historio de la eklezio, ke al fratino estas agnoskataj kanonikaj taskoj, normale rezervitaj nur al sacerdotoj. Patrino Azcune, naskiĝinta en Bilbao, laboras en Brazilo de pli ol 20 jaroj.

25 ĈEFEPISKOPOJ KAJ EPISKOPOJ de Ĉilio, kunigitaj en plena asembleo, deklaris: "Aliiĝoj, kiuj de multaj estas taksataj kiel revoluciaj, fakte respondas al la postulo de tre granda plimulto, kaj ili ne povas efektiviĝi sen ofero de la hieraŭaj kaj de la hodiaŭaj privilegiitoj". "Justeco - klarigis la prelatoj - nuntempe signifas kreskon, partoprenon, egalecon. Riĉeco, lukso de kelkaj, estas persista insulto al ti

uj, kiuj vivas en mizero. La evoluo de la lando - konkludas la episkopoj - estas hodiaŭ pli kaj pli malhelpata de la perforto, kiu, surbaze de diskriminacio ekscitas teruron, malcertecon, ofte furiozon".

HISTORIA ESTOS ĈI TIU JARO en la kvarcenta vivo de la tajlanda eklezio, ĉar la episkopa konferenco de la lando decidis la starigon de nova granda seminario. Jam de pli ol tri jarcentoj ekzistis en la iama Siamo, hodiaŭ Tajlando, la Ĝenerala Orienta Seminario, fondita de la Patroj por la Eksterlandaj Misioj el Parizo. Ĉi tiu glora societo hodiaŭ povas meritplene fieri, ĉar ĝi dum 3 jarcentoj pretigis la terenon por 40 diocezoj en Siamo kaj en aliaj aziaj nacioj, iom post iom transdonitaj al la aŭtoktona klerikaro; 33 misiaj teritorioj asignitaj al diversaj misiaj kongregacioj ; dum diversaj religiaj institutoj estis de ĝi speciale kreitaj aŭ larĝe helpitaj por misiado. Oni presigis multajn librojn en 28 aziaj lingvoj, 158 ĝiaj membroj donis por la kredo sian sangon; 21 el ili estis solene beatigitaj. Tiu pormisia Societo formadis por la eklezio milojn da pastroj kaj pli ol cent episkopojn. Fakte, tia estis ekde la naskiĝo, la celo de tiu Societo, laŭ la unua artikolo de ĝia konstitucio: "Unuaranga devo de la membroj de la Societo por la Eksterlandaj Misioj el Parizo estas zorgi pri la formado de indiĝena klerikaro... Tiu societo celis respondi al la konstitucio "Pri la indiĝena klerikaro." de la 22a de februaro 1662a, kiu invitis: "Oni klopodu ĉiamaniere starigi seminariojn por indiĝenoj". Pro politikaj kaŭzoj la Ĝenerala Seminario de Tajlando transloki ĝis 14 foje, tamen ĝi ĉiam daŭris ĝis hodiaŭ, donante al la eklezio multegajn sacerdotojn, episkopojn kaj martirojn, tiel ke ĝi meritis la gloran titolon "Seminario de la Martiroj. De la diversaj lokaj seminarioj ĝi ri-

cevis ĉiujare por la supera spirita kaj mensa formado la junulojn jam proksimajn al la sankta ordino. Fine la episkopa konferenco de la 10 tajlandaj diocezoj je la 29a de majo de la kuranta jaro decidis la starigon de la Granda Interdioceza Seminario, kiu laŭ la impulso de la Dua Vatikana Koncilo, celos doni formadon pli konforman al la naciaj paŝtistaj postuloj.

PAŜTISTA ZORGO PRI maljunuloj devas esti en la programo de la ekleziaj agadoj hodiaŭ pli ol en la pasinteco. Pro tio oni devas ĉerpi studojn kaj spertojn el tiuj, kiuj sin dediĉis jam al tio. En Aŭstrujo oni donas multan atenton al ĉi tio. Fakte, laŭ statistikaj indikoj, hodiaŭ unu miliono kaj duono da personoj,kio konsistigas la 17 procentojn de la loĝantaro, estas pli ol sepdekjaraj. La malfacilaĵoj de ilia anim zorgo reliefiĝas en la grandaj urboj, kie granda nombro da ili vivas apartigitaj, kvazaŭ ekster la sociaj rilatoj. En Vieno ekde kelkaj jaroj oni enkondukis eksperimentajn agadojn de "Asista servo por maljunuloj kaj malsanuloj"en la urba kvartalo Florisdorf. Tio konsistas en hejma asisto al malsanuloj, kun personaj interparoloj ĉe difinita loko; en pertelefonaj kaj perleteraj renkontiĝoj; sed ankaŭ en promenadoj kaj ekskursoj. De la ĉefepiskopo estis ankaŭ decidita fonduso por asisto al maljunuloj, kun la celo atentigi pri la problemo la starigontajn parokajn konsiliojn. Oni ankaŭ devas memori la kunvenon, kiu okazis en la aŭstria ĉefurbo pri la temo: "La tria fazo de la vivo - problemoj de maljunuloj en Aŭstrujo"; en kiu partoprenis 200 inter kuracistoj, sacerdotoj, sociaj asistantoj kaj flegistinoj. El la laboroj reliefiĝis interalie, la oportuneco pritrakti psikologian preparon al maljuneco por ke oni agnosku kaj valorigu la pozitivajn aspektojn de ĉi tiu vivaĝo.

DILIGENTAJ STUDOJ pri la necesoj de la katolika eklezio en Britujo kaj Kimrujo rilate al la eduka kampo estis deciditaj de la dulanda episkoparo, kunigita dum la ĵus pasintaj tagoj en la ĉefepiskopejo de Westminster, ĉe Londono. En la kunveno, gvidita de kard. Heenan, partoprenis 37 prelatoj el la 40, el kiuj konsistas la episkopa konferenco de la du landoj. En la diskutado oni decidis, ke poreduka komitato, tio estas la grupo de episkopoj, kiuj kunordigas la laborojn de la fakuloj en la diversaj edukaj sekcioj, klopodu pristrudi tre atente la "teologion de edukado" sub la lumo de la instruoj de la Dua Vatikana Koncilio, kaj enkonduku enketon pri la aktuala situacio de la katolikaj lernejoj de la du landoj. Konfirminte plenan apogon al la daŭrigo en la aktiveco de la katolikaj lernejoj, la episkopa konferenco esprimis deziron, ke el la studoj komisiitaj al la spertuloj, klare montriĝu la novaj edukaj vojoj, kun praktikaj indikoj por la eduka politiko je tutnacia nivelo.

KARD. HEENAN, ĈEFEPISKOPO de Westminster, en preskonferenco anoncis, ke okaze de enkonduko de katedro pri paco en universitato de Bradfort, ne nur ankaŭ la katolika eklezio donis sian varman konsenton, sed oni projektis diversajn iniciatojn por subteni tiun katedron. Li memorigis, ke "esence kristana estas ĉiu klopodo por la paco, por kio la katolika eklezio streĉe laboras, laŭ la volo de Kristo, por ĝia efektivigo en la justeco".

LA OPORTUNECO DISDONI la sakramentojn ankaŭ al infanoj subnormalaj, estis subtenata de "National Board of Religious Inspectors and Adviser", la katolika organo kiu kontrolas religian edukadon en la 19 diocezoj de Britujo kaj Kimrujo. La deklaro, kiu konkludas kunsidon okazintan en Londono, malaprobas la

opinion, laŭ kiu tiuj infanoj ne kapablus ricevi la konfesan kaj eŭkaristian sakramentojn kun la necesa preteco; kaj asertas, ke ĉi tio signifas senigi ilin de tiu spirita helpo, pri kiu ĉiuj kristanoj pro la ricevita bapto rajtas. "Ĉar la infanoj, eĉ la plej serioze mensmankaj, estas baptitaj kaj akceptitaj de la lokaj komunumoj, la praktikaj malfacilaĵoj rilatantaj la disdonon de la aliaj sakramentoj, povas esti superataj - admonas la deklaro - se ni plenkreskuloj scikapablos atendi pacience ilian respondon, kaj akcepti la simplecon de ilia parolmaniero, sentigante al ili la varmon de nia karitato".

EN LONDONO OKAZIS de la 19a ĝis la 22a de majo la ĝenerala asembleo de la internacia federacio de la katolikaj viroj. Temo de la kunveno estis: "La internacia federacio de la katolikaj viroj je servo de tri aspektoj de la homa progreso: evoluado, instruado kaj daŭra evangelizado". Inter la oratoroj estis kard. Heenan, ĉefepiskopo de Westminster; la episkopoj mons. Wesoly, helpanto en Ghiezno-Pollando-;mons. Grant, hep. de Northampton-Britujo; kaj Henry Rollet, prezidanto de la federacio.

DE LA TEMPO en kiu Buddismo aperis en Koreo, antaŭ 1600 jaroj, je la unua fojo du bonzoj loĝos en Francujo dum tri jaroj ĉe la benediktana abatejo de "Petro-gvidanto" por elstudi institucion, organizadon, evangelizajn metodojn, regadon de l' eklezio kaj krome sacerdotan kaj laikan formadon en la katolika eklezio. Post tri monatoj la du bonzoj surmetos la grizan tunikon de la katolikaj monakoj, por kuniĝi entute al la benediktanaj patroj. Dezirante ian nuntempiĝon antaŭ la mondevoluo, la du bonzoj volas malfermiĝi al tiu dialogo, kiun dum la universitataj studoj

ili komencis kun la benediktanaj monakoj; ĉar ili estas konvinkitaj, ke sen dialogo kun la aliaj religioj la buddismo estas en danĝero velki. "Pli ol diferenco de vivnivelo - ili deklaris - tio, kio ŝajnas al ni la plej granda malfacilaĵo, estas la mentaleca diferenco". Tamen ili tuj aldonis: "Kiel ajn ni fidas. Ĉar estas multaj komunaj punktoj inter nia vivo kaj tiu, kiun oni travivas en la katolika eklezio".

JUNULOJ, KIUJ EN FRANCUJO sin pretigas por sacerdotiĝi, estas 3.500. 600 el ili apartenas al diversaj religiaj institutoj; dum 2.900, kiuj fariĝos diocezaj pastroj, zorgas pri sia preparo ĉe porpastraj seminarioj, ĉe grupoj de formado laŭ universitata nivelo kaj en la laborista mondo. La superaj francaj seminarioj havis ĉijare 265 novajn seminarianojn. Inter ĉi tiuj estas 9 malfruaj vokiĝoj, 140 junuloj venantaj el la minoraj seminarioj, 27 el institutoj por katolika instruado, 19 el la ŝtataj superaj lernejoj, 11 el universitataj fakultatoj, 11 el la laborista medio. Siaflanke la francaj minoraj seminarioj akceptis 5.500 novajn studentojn; dum 89 junuloj, el kiuj 39 venantaj el la laborista medio, ekpartoprenis en specialaj formiĝaj grupoj. En la virinaj institutoj la nombro de la francaj junulinoj, kiuj sin pretigas por la religia vivo estas iom malpli ol 8.000.

oooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooo

ABONKOTIZO: It.£.: 1.000 (= Us.dol. 1,60)
Poŝtĝirkonto 3-7791 al D.ro C.C. Ferrari
aŭ 1-37638 al : P. Giacinto Jacobitti.

oooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooo